

# SCIENCA REVUO

UDK 001(05)=089.2

YU ISSN 0048-9557

Vol.27, n-ro 1(117)

25.02.1976.

---

Aperas 6-foje jare. Jarabono 56 steloj, 15 ned.gld., 6 us.dol., 100 jug.din.

---

## ENHAVO:

Szczurek K.: Evoluo de la titola paĝo (bibliologia skizo)  
 Joganzon-Logacev: Antropocenologio - scienco ... naturo  
 Biedulski Cz.: Biogenezo en la medio de prekambrio kaj ...  
 Atanasov A.: Disko de Fajstos

## EVOLUO DE LA TITOLA PAĜO

-BIBLIOLOGIA SKIZO-

(K. SZCZUREK, POLLANDO)

Se ni prenas libron en la manojn, eĉ ne por legi ĝin sed nur trarigardi, nia unua movo estas malfermi ĝin kaj rigardi la titolan paĝon. Ni tiel kutimiĝis fari tiun movon, ke se hazarde la titola paĝo mankus, ni rigardus tion surprizite kaj mire.

Sed la titola paĝo ja ne ĉiam troviĝis en la libro. En volvaĵoj, same en papirusaj kiel en pergamentaj, ĝi entute mankis. En la antikva tempo ne ekzistis eĉ la titolo, la verkojn oni nomis laŭ la komencaj vortoj de la teksto kaj laŭ la nomo de la aŭtoro. Nur pli poste, ĉar kreskadis la nombro de la volvaĵoj kaj ne facilis sen klaraj signoj distingi unu disde la aliaj, naskiĝis la ideo fiksi al la volvaĵoj etiketon kun indiko pri la verko. Mem la vorto "titolo" devenas de tiu etiketo nomata de la antikvaj romianoj *titulus* aŭ *index*, de la grekoj *sillybos*.

Post kiam la volvaĵo ŝanĝiĝis je volumo, oni la nomon de la verko skribis kutime ĉe la fino, malofte ĉe la komenco.

La monaĥo, fininte la skribadon, aldonis formulon *explicitus est* aŭ nur *explicit* kaj la nomon de la finita verko. Se li citis ĝin ĉe la komenco, tiam li skribis *hic incipit* aŭ nur *incipit* kaj la koncernan nomon. Fojfoje li aldonis ĉe la fino la skriblokon, sian nomon, la nomon de la posedonto k.s. Tiu kutimo daŭris dum la tuta epoko de manuskriptoj kaj eĉ en la komencaj jaroj de la presita libro. Ekzemple en la fama 42-linia biblio el la jaro 1455. ni povas legi: *incipit epistola sancti hieronimi ad paulinum presbiterum*. En multaj inkunabloj la unua folio de la libro restis nesurpresita. Presistoj vereble opiniis, ke ĝuste tiun folion plej minacas la detruo kaj lasis ĝin malplena, ŝirmanta la tekston sekvantan post ĝi. Fojfoje oni komencis presi sur la dorsa flanko de la unua folio, kion iniciatis en la 1464, la kolonja presisto U. Cel (Zell). La unua paĝo ankoraŭ estis malplena.

Sed laŭ fluo de la tempo oni komencis lokigi sur ĝin kvazaŭ "prototipon" de la postej plenaj titolpaĝaj indikoj la tiel nomatan itale *occhietto*:unu-du vortojn presitajn laŭ ksilografia metodo. Fojfoje estis pli da vortoj, kiel ekzemple en la konata presaĵo de Fust kaj Ŝefer (Schöffer) *Bulla Pii II contra Turcos*, el la jaro 1463. La presistoj klopodis doni al tiuj prototipaj titolpaĝoj pli allogan karakteron, kaj enkondukis kutimon ĉirkaŭi la titolan tekston per ksilografitaj ornamaĵoj, fojfoje okupantaj la tutan paĝon. Ili ankaŭ, paŝon post paŝo, enkondukis pliajn elementojn: la preslokon, la presjaron, la eldoniston k.s. Ekzemple, la en la 1476. aperinta *Galendarius* de Regiomontano sur la unua paĝo, havas indikojn *Venetiis 1475* kaj la nomon de la presisto: Ratdolt. Plenan titolpaĝon enkondukis en la 1500-a jaro la lipsia presisto V. Stekel (Stöckel). Tiel, malrapide, formiĝis la titola paĝo en la nuna senco. La plej grava tempo post evoluo de tiu paĝo estis la jardeko 1470-1480., kaj la sekvantaj dudek jaroj alportis pluan, jam rapidan evoluon.

Ĉiuokaze, en la dekseca jarcento la titola paĝo estis jam plene formiĝinta. En la slavaj landoj tio okazis iom pli poste. En Bohemio, ekzemple, unuaj titolpaĝoj aperis en presaĵoj elirintaj el la presejo de J. Kamp, Stahel - Preinlein, kaj - precipe - Beneda, kiu en sia lando enkondukis titolan paĝon surpresitan ankaŭ dorsflanke.

Ne konas la titolan paĝon fruaj rusaj libroj. Tie prelistoj kutimis komenci tekston per vinjeto, kiu en malnova rusa libro ludis gravan rolon. La klasika formo de la rusa vinjeto, nomata *zastavka*, stabiliĝis en la periodo XV - XVI, do antaŭ ol oni enkondukis la preson en tiun landon. Pietisme traktata ankaŭ post la enkonduko de la preso, ĝi fariĝis la eble plej grava ornamaĵo de la rusa libro. Post la komenca vinjeto sekvis tuj la kohera teksto. La titolpaĝoj aperis nur meze de la dekseca jarcento. Emfazan mencion meritas la belega volumo *Evangelije uĉitelnoje*, presita far Fjodorov en Zabłudov en la jaro 1569., posedanta apartan titolan folion sur kies dorsflanko troviĝas bele ksilografita blazono de Ĥodkjeviĉ, pola magnato kaj tiama posedanto de Zabłudov.

La titolon en la plej malnovaj presaĵoj komence oni skribis mane, ofte sur apartan folieton poste gluitan al la unua paĝo de la bindaĵo; kutime oni ĝin kovris per ŝirma korna membrano. Okazadis ankaŭ ke la titolon anstataŭ sur la bindaĵan fronton oni lokigis sur ties dorson, kion unua ekpraktikis en la XVI-a jarcento M. Froben en Basileo; troveblis eĉ libroj kun titolo skribita aŭ gravurita sur la antaŭan randon de la libro.

Kiam en la dekseca jarcento la libro ekservis al la humanismo kaj pli ofte aperadis verkoj de tiutempaj humanistoj partoprenantaj en la disputoj, la prelistoj, precipe en Germanio, presis apud la nomoj de la aŭtoroj pompajn epiteojn, laŭdaĵojn, omaĝajn versaĵojn k.s. Ankaŭ la titoloj mem, komence simplaj kaj koncizaj, plilongiĝis, ĝis tie - ie per

sia unika formo ili fariĝis siaspecaj ornamaĵoj: la teksto de la titolo kvazaŭ "malaperantis" t.e. similis triangulon, turnitan per unu angulo suben. Fojfoje estis tiaj trianguloj kelkaj sur la paĝo, ekz. tiajn du havas la titola paĝo de la fama verko de Direr (Dürer) *Underweysung de Messung mit dem Zirckel* el la jaro 1525.

Post kiam la titola paĝo fariĝis konstanta, ni diru "organika" parto de la libro, ĝi altiradis pli grandan atenton de presistoj kaj artistoj kaj ili evoluigis ĝin - same tekste, kiel orname - je siaspeca artaĵo, kiu poste travivis diversajn modojn koncerne stilon kaj plaĉon dum diversaj periodoj.

Ĉiam pli kaj pli oftaj fariĝis libroj kun titola paĝo ĉirkaŭita per ornama kadro. Tiu kadro, fojfoje montranta riĉan fantazion de sia kreinto, prezentis diversajn motivojn, ekz. kolonojn, amforojn, foliojn de akanto aŭ vito, fantaziajn bestojn, homajn figurojn k.a. Estis kadroj arabeskaj, kadroj imitantaj portalon, realaj kaj fantaziaj, oftis portreto de la aŭtoro kun - iom pli sube - ties nomo. Troveblis eĉ rebusoj kaŝantaj la aŭtoran nomon.

Pluaj jaroj alportis pluan evoluon, la motivaro riĉiĝis je arĥitekturaĵoj, alegoriaj figuroj simbolantaj la saĝecon, la amon, la justecon, kaj eĉ je tutaj scenoj. Tamen ĝustas mencii ke aperadis ankaŭ libroj kun titoloj ne ornamitaj.

Fojfoje la diversajn liniojn de la titolteksto oni presis per diversformaj tipoj. Plej ofte inter la ornamaĵoj kaj la enhavo de la libro ne ekzistis ia ajn ligo, la ambaŭ estis nedependaj unu de la alia, kvazaŭ hazarde kunmetitaj, kaj pasis multe da tempo antaŭ ol naskiĝis la ideo konformigi la ornamaĵojn al la libroenhavo, t.e. ilusti per ili la tekston mem. Al la meritplenaj artistoj en tiu branĉo apartenas interalie Grin (Grien), Holbajn (Holbein), kaj precipe Vajdic (Weiditz) - eminenta majstro de la titolpaĝo, praktikinta

preskaŭ ĉiujn ties formojn. Elstaras ankaŭ atingoj de Aman kaj Stimer, kiuj en la dekseca jarcento produktis larĝajn kadrojn kun kolonoj kaj alegoriaj figuroj. Ĝustas menciigi ankaŭ la bohemiajn presistojn P. Meziříčský (Meziříčsky) kaj, Ŝtirsa (Štyrsa). La unua presis ksilografie belajn titolpaĝajn kadrojn kun blankaj ornamaĵoj sur nigra fono; el prezentataj motivoj plej oftis arĥitekturaj kolonoj, branĉetoj kun folioj, sirenoj, drakoj, medalionoj kun bustoj. La kadroj de Ŝtirsa abundis je festonoj, kvastoj, vitoj, diversaj fruktoj kaj la tiel nomataj *putti* t.e. grasaj infanetoj, oftaj precipe en la italaj presaĵoj.

Inter tiutempaj Bohemiaj libroj rimarkinda estas la unike valora titolpaĝo en la libro *Pisně chval božských*, presita far Paŭlo Severin. La titolan tekston, nigran-ruĝan, ĉirkaŭas larĝa ksilografita kadro kun du flanke starantaj (dekstre kaj maldekstre) figuroj de Solomono kaj Davido. Sube kantas koruso. Tiu titolpaĝo, montranta noblan guston de sia aŭtoro, estas nedependa de eksterlandaj influoj.

Sed, ĉar la pulsanta vivo inkluzivis ankaŭ la libron, post kelkaj jardekoj novaj ideoj ŝanĝis la tiaman plaĉon. Fine de la dekseca jarcento la arta nivelo de la libro evidente sinkis. Oni uzadis malpli bonan paperon, la preso perdis sian precizon, la ornamaĵoj evoluis direktan al troa originaleco. La titoloj fariĝis pli kaj pli longaj ĝis ili fine evoluis je barokaj "serpenteskoj", fojfoje malklarigantaj sian propran sencon. Specifa eco de la barokaj libroj estis duoblaj titoloj, el kiuj la dua aldone klarigis la unuan, kaj per tio ankaŭ la enhavon de la verko, ekzemple:

*Edgar aŭ ekstermo de lupoj en Anglio, Marĉando pri edzino aŭ la fremda pli bongustas, Don Kiĥoto aŭ ternanta ĉokolado, La floroj de Don Juano aŭ kiel povrulo interŝanĝis sian staton kun riĉulo, Moralia aŭ aferoj por moroj, instruoj kaj admonoj en ĉiu stato de la homa vivo, el latinaj kaj polaj*

rakontoj en la gepatra lingvo koncize skribitaj. Al la barokaj titoloj aldoniĝis same longaj ĉar abunde titolitaĵoj nomoj de la aŭtoroj, diversaj dediĉoj, kaj nomoj de nemalpli titolitaĵoj adresatoj de la dediĉoj.

Same abundiĝis la titolpaĝaj ornamaĵoj. Kune kun la teksto ili fojfoje okupis la tutan paĝon, preskaŭ ne lasante sur ĝi liberan lokon. Plimulto de la barokaj titolpaĝoj ne toleras komparon kun tiuj el la renesanca epoko, plenaj da modereco kaj gusto, sed tie-ie troveblas ekzempleroj elstarantaj super la ĝeneralan, mezan nivelon. Tio koncernas precipe la verkaĵojn projektitajn de la fama pentristo Rubens. Ankaŭ la tiel nomataj "ĉeĥaj fratoj" eldonadis en Moravio librojn distingiĝantajn per tre bonguste komponitaj titolpaĝoj. Ili aplikadis ksilografitajn kadrojn precipe en postiloj, en aliaj presaĵoj kutime uzadis nur malgrandajn vinjetojn, delikatajn kadrojn arabeskajn aŭ entute nur noblajn presliterate- rojn.

La baroko estis ankaŭ tempo dum kiu disfloris la kuprogravuraĵo, interalie sur la titola paĝo. Cetere, tio ne estis pura novaĵo, kuprogravuraĵon ni povis vidi jam en la jaro 1495. sur la titola paĝo de *Compendio delle Revelationi* de Savonarola, sed tiam ĝi estis escepto. Dum la baroko ĝi estis aplikata amase. Oni asertas ke la unua titolpaĝo plene gravurita en kupro estis tiu de *Compendiosa totius anatomiae delineatio* de A. Vesalio, eldonita en la 1545. far T. Gemini. Kvankam la gravuristo estis vereble P. Keke van Elst (Coecke van Aelst), la verko montras fortan influon de la itala pentroarto. Cetere, Italio estis la lando kie baldaŭ poste la kuprogravuraĵo ekregis la titolan paĝon, kaj longe tiuj du landoj - Italio kaj Nederlando - rivalis sur tiu kampo.

Ne tiom multe ŝanĝiĝis la titoloj mem. Iom post iom estis malaperantaj la pompaj dediĉoj, la longaj titoloj de la aŭtoroj kaj dediĉadresatoj, sed mem la titolo plu longis,

fojfoje okupante la tutan paĝon. Daŭris tio proksimume ĝis la mezode de la deknaŭa jarcento, precipe en popolaj eldonaĵoj. Ofte troveblis tiam *Pentrita mondo de objektoj videblaj, percepteblaj per la sensoj, en kvar lingvoj, aŭ figuroj kaj nomoj latine, pole, france kaj germane de ĉiuj objektoj en la mondo kaj de la homaj agoj, Nova Ateno aŭ akademio plena de ĉiuj sciencoj, dividita je diversaj titoloj kvazaŭ je classes, dediĉita al saĝaj - por memoro, idiotoj - por instruo, politikistoj - por praktiko, melankoliuloj - por distro ...* (ĉi tie sekvis versaĵo estanta integra parto de la titolo), *Sibila libro pri la estonteco. Kolekto de klarigoj, profetaĵoj kaj vizioj pri diversaj nacioj precipe pri la katolika eklezio, pri Pollando kaj slavio, el malnovaj libroj; el diversaj periodaĵoj kaj el la buŝo de la popolo, kun aldono eksterordinara: Vernihora profetas la estontecon.*

Post kiam finiĝis la baroko, finiĝis ankaŭ ties presarta maniero. Forĵetinte la abundemon de la antaŭa epoko, la libro ekascendis al novaj atingoj - pensaj kaj artaj. La teksto, la ornamaĵoj kaj la ilustraĵoj denove integriĝis je harmonia tutaĵo. Multe de la baroka pompo malaperis kaj sur la titola paĝo oni povis denove vidi "iom da blanka spaco". Inter la titola teksto kaj la indikoj pri la presloko, la presjaro kaj la eldonisto ofte troviĝis gracia ksilografita aŭ kuprografita vinjeto kun flora ornamaĵo, kun Amoro kaj Gracioj, kun medalionoj aŭ emblemoj. Sed ĉio montris noblan moderecon, evitante abundon. Ofte okazadis ke la titolpaĝaj ornamaĵoj estis la ununuraj en la volumo.

Novaj tempoj alportis novajn plaĉojn. La posteaĵ ŝanĝoj ne estis tamen tiel esencaj, kvankam pri la titola paĝo okupiĝis multaj artistoj. La anglaj prerafaelitoj serĉis modelojn ĉe la plej malnovaj majstroj de la presarto. En Germanio dum kelka tempo oni imitis la presmanieron germanan el la tempo de la renesanco. En Bohemio belajn rezultojn at-

ingis la talenta artisto J. Manes, aŭtoro de multaj titolpaĝoj en kiuj li klopodis eviti influon de diversaj skoloj kaj trovi propran, sendependan esprimmanieron. La samon oni povas diri pri la pola eminenta artisto S. Vispianski (Wyspianski). Li ne imitis la malnovajn majstrojn, sed kreis propran stilon parte fontantan el la popola arto. La titolaj paĝoj de Vispianski, konstruitaj laŭ la principo de du perpendiklaj aksoj, distingiĝas per eleganta simpleco.

En la malnova kutimo "trotitoligi" la verkon ĝermis kaj evoluis nova, aŭ prefere rea tendenco je simpleco. Pli kaj pli ofte, precipe en la beletro, aperadis titoloj koncizaj, simplaj, senpompaj: *Pinokio*, *Tri amoj*, *La ĝojo*, *Alkoholoj*, *Kakao*, *Majtingalo*, *Sorto de l' homo*. Ekofitis titoloj metafore nomantaj tion kion pritraktis la verko. Senkjeviĉ (Sienkiewicz) sian grandan historian romanon nomis *inundo* kvankam tute ne temas pri inundo. Kami (Camus) faris la samon en *La pesto*, kaj da similaj ekzemploj eblas citi multe pli. Tiel statas la situacio nun. La nuntempaj artistoj evitas provizi la titolajn paĝojn je ilustraĵoj aŭ abundaj ornamaĵoj. Ili preferas efiki nur per arta kombinado de nigro kaj blanko. Eta, bonguste verkita vinjeto, nobla tiparo forme konformanta al la karaktero de la verko, harmonia dislokigo de signoj sur la blanka fono de la titolpaĝo, bonkvalita papero - jen agiloj de nuntempaj projektantoj de la titolpaĝoj, kaj samtempe faktoroj decidantaj pri la arta valoro de tiuj paĝoj. Kaj krome: ŝparemo, modereco kaj evitemo de parvenigusta troornamo. Ĉi tia tendenco nun, en la 1970-80. jaroj, ne montras simptomojn de maljuniĝo kaj mortemo.

## § §

Kion ni diris pri la eŭropaj libroj, koncernas ankaŭ la arabajn. La unua libro kiun oni entute skribis ĉe la araboj - estis Korano, sed la unuaj kopioj eĉ de tiu sankta verko aspektis tre modeste. Mankis ne nur apartaj titolpaĝoj



sed eĉ aparte skribitaj titoloj. Tiujn titolojn, simple, oni ligis al la kohera teksto, tiel ke ambaŭ kunfandiĝis je unu seninterrompa skribaĵo. Pasis longa tempo antaŭ ol pli inventemaj kaligrafoj komencis skribi la titolajn paĝojn pli dike aŭ per alikolora inko, kutime ruĝa, kaj pli poste naskiĝis ideo dediĉi al la titoloj apartan lokon. Tia aparta soleca titolo jam per si mem sugestis al la skribanto, ke li plibeligu ĝin per ornamaĵoj, kaj envere oni klopodis tion fari uzante ne nur aliajn skribsignojn kaj koloran inkon, sed ankaŭ pentrante ĉirkaŭ la titolo arabeskan kadron. Plej pompe oni kutime ornamis la unuan suraon de Korano, nomatan Al Fatiha (La Apertanta).

La araba libro multe pli longe ol la eŭropa travivadis la epokon de permana skribado kaj, sekve, de permana ornamado. Eble el tio fontis la mirindaj atingoj de la araba Ornama arto. En Eŭropo aparta titolpaĝo, precipe tentanta la skribanton, aperis nur post la invento de la preso, do tie povis temi nur pri teĥnika ornamado; en la islama mondo la ornamistoj povis evoluigi sian arton dum kelkaj jarcentoj, estas do tute nature ke ili atingis tiajn admirindajn sukcesojn. Ekzistas arabaj kaligrafitaj libroj kies titolpaĝoj ravas per sia beleco. Kaj aparte efikas specifaĵo pure araba, ne praktikita (almenaŭ en tia formo) en aliaj landoj - la arabesko.

Post kiam la araboj ekpraktikis la presadon, ilia libro similiĝis al la eŭropa kaj nun inter la ambaŭ ne ekzistas principaj diferencoj.

§ § §

§ §

Kio influadis la evoluon de la titolpaĝo? Ĉefan signifon havis certe du faktoroj: la arta kaj la ekonomia.

Kreemo kaj inventemo de la presistoj kaj artistoj stimulis ilin krei ĉiam pli kaj pli novajn projektojn, pentris

en fantazio novajn bildojn pli freŝajn kaj pli konformajn al la ŝanĝiganta sento pri la beleco. En la arto tiu strebado estas eterna kaj nehaltigebla.

Sed eble egalan signifon havis la faktoro ekonomia. La kreskanta nombro de presejoj kaj eldonejoj fortigis la konkurencon; pro ĝi la presistoj klopodis plibeligi sian produkton fari ĝin pli interesa, okulfrapa, scivolemiga, flata al la vanteco kaj splendoremo de la leganto, pli altiranta ties atenton.

Verko dediĉita al reĝo, episkopo, magnato k.s. kutime kaŭzis ke la dediĉito bonvolis pli favore ekrigardi la aŭtoron, helpi lin mone, fojfoje premii alimaniere. Tial longan titolon devis akompani same longa kaj pompa dediĉo.

Kiu pekulo, deprimita per vizio de siaj postmortaj turmentoj, ne sakrus je la *Hundaĉo infera* pian animon sekrete insidanta kaj, ekvidinte verkon *Spirita klisterilo* por animoj konstipitaj per pekoj, ne tuĵ ekdeziris forigila abomenindaĵon de sia animo? Kiu hezitis aĉeti *Pistolon kun streĉita ĉano* por mortigi la damnan pekon aŭ edifan verkon *Animo* post multaj pekoj ekstrebante reĉastigi sian vivon serĉas en dezertoj la sanktan Marian Egiptaninon, por ke ŝi instruu ĝin la manieron de sincera pento kaj montru la vojon al feliĉa eterneco.

Kiujn geedzojn aŭ geamatojn ne allogus la incita *Medicina konsultilo* por geamatoj kaj geedzoj, kaj instruo pri malsanoj el la sfero de la seksoj vira kaj virina, kiel ilin eviti kaj kuraci. La arto konservi junaĝan ĉarmon plenan forton kaj sanon ĝis la plej alta aĝo.

Nerva frostotremo certe trakurus viron ĉiuaĝan se li ekvidis la esperigan verkon *Slosilo* por virina koro laŭ la plej certa metodo por venki koron eĉ plej rezistan. Verkis Don Ferdinando, kiu konkeris 473 virinkorojn kaj feliĉa mortis en la manoj de la kvarcent sepdekkvara adorantino. Li vi-

vis 97 jarojn, 3 monatojn, 9 tagojn, 5 horojn kaj 3 1/2 minutojn.

Por aĉeti tian trezoron, valoras elspezi eĉ la lastan groŝon. Ĉu do ne ĝustis streĉi la cerbon por krei tiajn titolojn? Nu, ni iome ekŝercis pri la problemo, tamen fakto estas fakto - la ekonomiaj kialoj influadis la evoluon de la titola paĝo kaj ilia signifo estis principa. Cetere, tiun signifon ili ne tute perdis eĉ hodiaŭ.

La titola paĝo estas problemo ne nur de la presarto sed ankaŭ de la plastikaj artoj, tial ĝian evoluon determinis la leĝoj regantaj tiujn artbranĉojn. Ĝi ĉiam konformis al la estetikaj principoj validaj en la sinsekvaj periodoj-ekz. gotiko, baroko, klasicismo k.t.p. kaj harmoniis kun artaj atingaĵoj de tiuj periodoj. La "spirito de la epoko" speguliĝis ne nur en arĥitekturaĵoj, pentraĵoj, skulptaĵoj k.s. sed ankaŭ en la libro. Kaj ĉar la libro estas kohera estaĵo konsistanta el elementoj kaj enhavaj, kaj formaj, oni devas - volante ekkoni ĝin plene - esplori ne nur la enhavon sed ankaŭ la formon.

En tiu strebado ni ne preteratentu la titolan paĝon, ja ĝi unusola fojfoje povas diri al ni pli multe, ol ampleksa disertaĵo.